Protokolo №3 de la Estrara decido
Dato: 05.08.2022.
Voĉdonado: reta.
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin, A. Junusov.
Tagordo / temo:
Protesta letero de REU al UEA pri la kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina.
Kunteksto:

- La 31-an de julio 2022 la Estraro de REU eksciis pri aperinta en la komitata dissendolisto de UEA amaso de ĉikanaj mesaĝoj fare de kelkaj UEA-komitatanoj kun alvokoj eksigi Svetlana Smetanina de la posteno de Ĉefdelegito de UEA por Rusio.
- En la Estraro de REU estis proponite sendi al UEA protestan leteron reage al tiu kampanjo en la komitata dissendolisto.
- Komence Aleksandr Lebedev proponis malnetaĵon de la letero. Sekvis aktiva diskutado kun proponoj pri aldonoj al la teksto de letero. La letero post aldonoj tamen evidentiĝis tro longa kaj peza. Fine, sian varianton de reverkita letero proponis Irina Gonĉarova. Tiu varianto estis pli kurta, glata kaj klara. Ĝi estis akceptita (5 voĉoj por, 1 kontraŭ) kiel fina varianto kaj sendita al UEA-Estraro la 5-an de aŭgusto.

Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 1;
sin detenis: 0.
Suplementoj:

A) Protesta letero de REU al UEA pri la kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Suplemento A. Protesta letero de REU al UEA pri la kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina

Estimataj estraranoj de UEA,

Kun bedaŭro ni konatiĝis kun amaso de ĉikanaj mesaĝoj fare de kelkaj UEA-komitatanoj kun alvokoj eksigi Svetlana Smetanina de la posteno de Ĉefdelegito de UEA por Rusio.

Ni volus komuniki al vi la jenon.

Ni opinias, ke ajna homo, inkluzive funkciulojn de organizaĵoj, rajtas havi sian propran opinion pri io ajn kaj esprimi tiun ie ajn en sia nomo. Same privataj politikaj eldiroj de homo ne devas esti preteksto por eksigi la personon de la posteno en statute neŭtrala organizaĵo. Neniu REU-estrarano esprimis sian opinion pri la nuna politika situacio je la nomo de REU. Ankaŭ Svetlana Smetanina ne faris tion. La atako kontraŭ ŝi havas fortan odoron de netoleremo al alia vidpunkto kaj persekutado laŭ politikaj motivoj.

Se UEA komencos eksigi siajn estraranojn aŭ membrojn pro privataj politikaj sinesprimoj, al UEA ne plaĉaj, ĝi devas fari la samon ankaŭ rilate al siaj membroj kun kontraŭaj politikaj vidpunktoj.

Aliokaze UEA montros sin kiel organizaĵo ne plu neŭtrala kaj forte vundos sian universalecon, ĉar evidentiĝos, ke ĝi reprezentas nur esperantistojn kun unu opinio kaj forĵetas esperantistojn kun la alia. Evidentas, ke tiu vojo gvidas al ruinigo de la tuta asocio.

Ni traktas la vidpunktojn kaj proponojn de sinjoro Osmo Buller rilate al Svetlana Smetanina kiel lian privatan opinion, esprimi kiun li rajtas same, kiel liaj subtenantoj kaj oponantoj. Ni esperas, ke la Estraro de UEA ne dronos en la marĉo de politika engaĝiĝo. Ni kredas, ke UEA restos sur la platformo de neŭtraleco kaj egalrajteco de siaj postenuloj kaj membroj.

Ni ripetas nian proponon daŭrigi la ĉefdelegitecon de Svetlana Smetanina kaj avertas, ke ni ne kunlaboros kun alia Ĉefdelegito, se li aŭ ŝi estos enoficigita rezulte de la maljusta eksigo de la nuna.

Estraro de REU